

KATOLIKA SENTO

Periodico dell'Unione Esperantista Cattolica Italiana (UECI)

www.ueci.it

"Per la promozione della fratellanza e della comprensione tra i vari popoli di diverse lingue" (Paolo VI)

Periodico bimestrale - Reg. trib. di Vercelli 22.12.1997 n. 306 -
Sped. in abb.post. art. 2 comma 20/c L662/96 - filiale di Vercelli -
Direttore resp.: Mons. Gianni Ambrosio - Dir. e amm.: Vercelli, via Benadir, 62
stampato da **atena.net** - Grisignano di Zocco (VI)

Anno 95 - n. 3
MAGGIO - GIUGNO 2016



MAJO 2016

Monato dedicita al Maria



In occasione del mese della Madonna
trascriviamo delle preghiere scritte in
suo onore da alcuni santi che ebbero
per Ella una particolare devozione.

(ha tradotto in Esperanto Antonio De Salvo)

Preghiera di San Francesco d'Assisi

TI SALUTO, SUA ANCELLA

Ti saluto, Signora santa,
regina santissima, Madre di Dio, Maria,
che sempre sei Vergine,
eletta dal santissimo Padre celeste
e da Lui,
col santissimo Figlio diletto
e con lo Spirito Santo Paraclito,
consacrata.
Tu in cui fu ed è
ogni pienezza di grazia e ogni bene.
Ti saluto, suo palazzo.
Ti saluto, sua tenda.
Ti saluto, sua casa.
Ti saluto, suo vestimento.
Ti saluto, sua ancella.
Ti saluto, sua Madre.
E saluto voi tutte, sante virtù,
che per grazia e lume dello Spirito Santo
siete infuse
nei cuori dei fedeli
affinché li rendiate,
da infedeli, fedeli a Dio.



Okaze de la monato de la Madono
ni transdonas preĝojn verkitaj en
ŝia honoro de kelkaj sanktuloj, kiu
havis por Ŝi apartan devotecon.

(Esperantigis Antonio De Salvo)

Preĝo de Sankta Francisko el Asizo

MI VIN SALUTAS, LIA SERVANTINO

Mi vin salutas, sankta Sinjorino,
sanktega reĝino Patrino de Dio, Maria,
kiu ĉiam estas Virgulino,
elektita de la sanktega ĉiela Patro
kaj de Li,
kun la sanktega amata Filo
kaj kun la Sankta Spirito Konsolanto,
konsekrita.
Vi en kiu estis kaj estas
ĉiu pleneco de graco kaj ĉiu bono.
Mi vin salutas, lia palaco.
Mi vin salutas, lia tendo.
Mi vin salutas, lia domo.
Mi vin salutas, lia vestaĵo.
Mi vin salutas, lia servantino.
Mi vin salutas, lia Patrino.
Kaj mi salutas vin ĉiujn, sanktaj virtoj,
kiuj pro graco kaj lumo de la Sankta Spirito
estas denaske
enmetitaj en la koroj de la fideluloj
por ke vi igu ilin,
el nefidelaj, fidelaj al Dio.

Preghiera di Santa Ildegarda di Bingen**TU CANDIDO GIGLIO**

Ave, nobile, gloriosa e intatta fanciulla,
 tu pupilla della castità,
 tu materia della santità che piacque a Dio.
 In te infatti avvenne quella celeste infusione,
 per cui il Verbo divino si rivestì in te di carne.
 Tu candido giglio,
 cui Dio volse lo sguardo
 prima d'ogni altra creatura.
 O bellissima e dolcissima;
 quanto grandemente Dio
 in te si è compiaciuto!
 Nel calore del suo abbraccio
 ha fatto germogliare in te suo Figlio,
 così che potesse ricevere da te il latte.
 Così il tuo grembo esultò di gioia,
 quando tutta la sinfonia celeste da te sgorgò,
 perché tu, o Vergine, portasti il Figlio di Dio,
 per cui la tua castità rifulse in Dio.
 La tua carne provò gioia,
 come l'erba su cui ricade la rugiada
 infondendovi freschezza;
 così è accaduto anche in te,
 o Madre di tutte le gioie.
 Ora tutta la Chiesa risplenda di gioia
 e risuoni nell'armonia
 per la dolcissima Vergine Maria,
 degna di lode, Madre di Dio. Amen.

Preĝo de Sankta Hildegarda el Bingen**VI BLANKEGA LILIO**

Saluton, nobla, glora kaj netuŝita knabino,
 vi pupilo de ĉasteco,
 vi materio de la sankteco kiu plaĉis al Dio.
 En vi fakte okazis tiu ĉiela enverŝo,
 per kiu la dia Vorto vestis sin en vi per karno.
 Vi blankega lilio,
 al kiu Dio turnis sian rigardon
 antaŭ ĉiu alia kreitaĵo.
 Ho belega kaj dolĉega;
 kiom grande Dio
 en vi havis plaĉon!
 En la varmo de via brakumo
 Li burĝonigis en vi sian Filon,
 tiel ke Li povu ricevi de vi la lakton.
 Tiel via sino eksaltis pro ĝojo
 kiam la tuta ĉiela simfonio eliĝis de vi,
 ĉar vi, ho Virgulino, portis la Filon de Dio,
 pro kio via ĉasteco brilegis en Dio.
 Via karno spertis ĝojon,
 samkiel la herbo sur kiun falas la roso
 enverŝante en ĝin freŝecon;
 tiel okazis ankaŭ en vi,
 ho Patrino de ĉiuj ĝojoj.
 Nun la tuta Eklezio brilegu pro ĝojo
 kaj resonu en la harmonio
 pro la dolĉega Virgulino Maria,
 inda je laŭdo, Patrino de Dio. Amen.

Preghiera di San Bernardino da Siena**SIGNORA DELL'UNIVERSO**

O Donna da tutti e sopra tutti benedetta!
 Tu sei l'onore
 e la difesa del genere umano;
 tu sei la Madre di Dio;
 tu la Signora dell'universo,
 la regina del mondo.
 Tu sei la perfezione dell'universo
 e il decoro della santa Chiesa;
 tu tempio di Dio;
 tu giardino di delizie;
 tu porta del cielo, letizia del Paradiso
 e gloria ineffabile del sommo Dio;
 veramente è balbettando
 che cantiamo le tue lodi e le tue bellezze.
 Supplicisci con la tua bontà
 alle nostre insufficienze.

Preĝo de Sankta Bernardeno el Sieno**SINJORINO DE LA UNIVERSO**

Ho Virino de ĉiuj kaj super ĉiuj benata!
 Vi estas la honoro
 kaj la defendo de la homaro;
 vi estas la Patrino de Dio;
 vi la Sinjorino de la universo,
 la reĝino de l' mondo.
 Vi estas la perfekteco de la universo
 kaj la ornamo de la sankta Eklezio;
 vi templo de Dio;
 vi ĝardeno de delicoj;
 vi pordo de la ĉielo, gajeco de Paradizo
 kaj ne eldirebla gloro de la plejalta Dio;
 vere balbute
 ni prikantas viajn laŭdojn kaj viajn belajojn.
 Riparu per via boneco
 la mankon de niaj nesufiĉoj.

Preghiera di San Massimiliano Kolbe**VERGINE TUTTA SANTA**

Vergine immacolata,
 scelta tra tutte le donne
 per donare al mondo il Salvatore,
 serva fedele
 del mistero della Redenzione,
 fa' che sappiamo rispondere
 alla chiamata di Gesù
 e seguirlo sul cammino della vita
 che conduce al Padre.
 Vergine tutta santa,
 strappaci dal peccato
 trasforma i nostri cuori.
 Regina degli apostoli,
 rendici apostoli!
 Fa' che nelle tue sante mani
 noi possiamo divenire strumenti docili
 e attenti per la purificazione
 e santificazione
 del nostro mondo peccatore.
 Condividi con noi la preoccupazione
 che grava sul tuo cuore di Madre,
 e la tua viva speranza
 che nessun uomo vada perduto.
 Possa, o Madre di Dio,
 tenerezza dello Spirito Santo,
 la creazione intera celebrare con te
 la lode della misericordia
 e dell'amore infinito.

**Preĝo de Sankta Maksimiliano Kolbe****TUTE SANKTA VIRGULINO**

Senmakula Virgulino,
 elektita inter ĉiuj virinoj
 por donaci al la mondo la Savanton,
 fidela servantino
 de la mistero de Elaĉeto,
 faru ke ni kapablu respondi
 al la voko de Jesuo
 kaj sekvi lin sur la vojo de la vivo
 kiu kondukas al la Patro.
 Tute sankta Virgulino,
 forŝiru nin el la peko,
 transformu niajn korojn.
 Reĝino de la apostoloj,
 igu nin apostoloj!
 Faru ke en viaj sanktaj manoj
 ni povu fariĝi obeemaj kaj atentaj
 instrumentoj por la purigo
 kaj la sanktigo
 de nia pekema mondo.
 Kundividu kun ni la zorgon
 kiu pezas sur via koro de Patrino,
 kaj vian vivan esperon
 ke neniu homo pereu.
 Povu, ho Patrino de Dio,
 teneraĵo de la Sankta Spirito,
 la tuta kreitaro celebri kun vi
 je laŭdo de la mizerikordo
 kaj de la senfina amo.

I testi in italiano sono stati presi dal sito:

<http://www.preghiereperlafamiglia.it/pregchiere-a-maria.htm>

I testi in esperanto, sono stati presi dalla pagina Fecebook dell'IKUE:

<https://eo-eo.facebook.com/pages/Internacia-Katolika-Unui%C4%9Do-Esperantista/263471327120529>

**NITRA: IKUE-KONGRESO**

Novaĵoj:

Por plifaciligi la partoprenon, la estraro decidis malaltigi la tarifojn.
 Pro tio, por la Italoj (B-landanoj):

Aliĝkotizo: 35 € ĝis la 31-a de Majo – poste 50 €.

Gastado: 1-lita ĉambro: 311€ / 2-lita ĉambro: 246 € / 3-lita: 226 € /
 4-lita: 210 € / 5-lita: 201 €.

Pli da informoj kaj aliĝilo troviĝas en: <http://www.ueci.it/aliĝxiloj/>
 Aliĝilon, oni povas peti ankaŭ de la prezidanto de UECI.

Amoris Lætitia

Dopo il Sinodo Straordinario sulla Famiglia, è uscita in data 19 marzo – festa di san Giuseppe – la Esortazione Apostolica Postsinodale “*Amoris Lætitia*” con la quale papa Francesco ne tira le conclusioni. Si tratta di un ampio volume (di circa 300 pagine) in cui Francesco, con il suo stile concreto e nello stesso tempo profondo, tratta “La gioia dell’Amore” nella famiglia. È quasi un poema in prosa diviso in nove capitoli:

1) *Alla luce della Parola*, 2) *La realtà e le sfide delle famiglie*, 3) *Sguardo rivolto a Gesù*, 4) *L’amore nel matrimonio*, 5) *L’amore che diventa fecondo*, 6) *Alcune prospettive pastorali*, 7) *Rafforzare l’educazione dei figli*, 8) *Accompagnare, discernere e integrare la fragilità*, 9) *Spiritualità coniugale e familiare*.

Ogni capitolo è a sua volta suddiviso in un totale di 59 sottocapitoli e questi in un totale di 325 paragrafi. Nella prefazione papa Francesco consiglia non una lettura generale affrettata, ma un paziente approfondimento di una parte dopo l’altra, dove ognuno cercherà quello di cui ha bisogno. È probabile che i coniugi si riconoscano nei capitoli quarto e quinto, che gli operatori pastorali abbiano più interesse per il capitolo sesto, e che tutti si sentano interpellati dal capitolo ottavo.

Questo capitolo ottavo era quello più atteso dai mass-media perché affronta il tema delle situazioni irregolari (convivenze, matrimonio solo civile, divorziati risposati, unioni omosessuali, matrimoni misti). In queste situazioni viene ribadita la necessità e l’importanza dell’accoglienza, dell’accompagnamento e del valutare ogni singolo caso con carità, nello spirito dell’anno della Misericordia. Tuttavia, su questi temi, l’atteggiamento della Chiesa è rimasto sostanzialmente immutato.

Post la Eksterordinara Sinodo pri la familio, la 19-an de Marto – feston de sankta Jozefo – estis eldonita la Apostola Postsinoda Alvoko: “*Amoris Lætitia*”, per kiu papo Francisko eltiras ties konkludojn. Temas pri vasta volumo (ĉirkaŭ 300-paĝa) en kiu Francisko, per sia stilo konkreta kaj samtempe profunda, pritraktas “La ĝojo de la Amo” en la familio. Ĝi aspektas kvazaŭ poemo en prozo disigita en naŭ ĉapitroj:

1) *Je la lumo de la Vorto*, 2) *La realo kaj la defioj de la familioj*, 3) *Rigardo direktita al Jesuo*, 4) *La amo en la geedziĝo*, 5) *La amo fariganta fekunda*, 6) *Kelkaj paŝtitaj perspektivoj*, 7) *Plifortigi la edukon de la filioj*, 8) *Akompani, distingi kaj integri la fragileco*, 9) *Geedza kaj familia spiriteco*.

Ĉiu ĉapitro estas siavice disigita sume en 59 subĉapitroj kaj ĉi tiuj en sume 325 paragrafoj. En la antaŭparolo papo Francisko konsilas ne rapidan kaj ĝeneralan legadon, sed paciantan pliprofundigon de unu parto post la alia, kie ĉiu elserĉos tion de kio li bezonas. Estas probable, ke la geedzoj rekonos sin en la ĉapitroj kvara kaj kvina, ke la paŝtitaj kunlaborantoj pli interesiĝos pri la sesa ĉapitro, kaj ke ĉiuj sin trovas alvokataj de la oka ĉapitro.

Ĉi tiu oka ĉapitro estis tiu pli atendata de la amas-komunikiloj, ĉar ĝi alfrontas la temon de la ne-regulaj situacioj (kunvivado, nur civila geedziĝo, eksedziĝintoj reedziĝintaj, samseksema kuniĝo, miksitaj geedziĝoj). En ĉi tiuj situacioj estas gravaj la akceptado, la akompanado kaj la komprenkapablo de la apartaj situacioj, en la spirito de la Jaro de la Mizerikordo. Tamen, pri ĉi tiuj temoj, la sinteno de la Eklezio restas substance neŝanĝata.





MALFERMITAJ AL LA TUTA MONDO

Rubriko zorge de frato Pierluigi Svaldi

IL PECCATO E LA MISERICORDIA

«Il tema della misericordia si va accentuando con forza nella vita della Chiesa a partire da Paolo VI. Fu Giovanni Paolo II ha sottolinearlo fortemente con la “Dives in misericordia”, la canonizzazione di santa Faustina e l’istituzione della festa della Divina Misericordia nell’Ottava di Pasqua. Su questa linea, – continua papa Francesco nell’intervista fattagli dal giornalista don Antonio Rizzolo – ho sentito che c’è come un desiderio del Signore di mostrare agli uomini la sua misericordia».

Il Signore ha deciso di farsi presente con la sua misericordia in un mondo dove si moltiplicano le notizie cattive, le crudeltà e le atrocità più inaudite. Noi tutti abbiamo bisogno di incontrare la misericordia almeno per vincere la grande paura che serpeggia fra la gente e che ci condiziona la vita di tutti i giorni. Possiamo dire che è arrivato il tempo di far combaciare il desiderio di Dio con il nostro bisogno attuale di uscire da questa situazione inaccettabile.

Il primo passo da fare e che ci viene proposto in molti modi è quello di riconoscerci peccatori, di scoprire i pesi che ci portiamo dentro e che ci impediscono di vivere con serenità e speranza. Questo passo va fatto senza adottare la linea dura, senza

LA PEKO KAJ LA MIZERIKORDO

«La temo de la mizerikordo estas ĉiam pli kreskanta en la vivo de la Eklezio ekde la regado de Paŭlo la 6-a. Estis Johano Paŭlo la 2-a, kiu precipe substrekiĝis ĝin pere de la “Dives in misericordia”, la kanonigo de sankta Faŭstina kaj la starigo de la festo de la Dia Mizerikordo en la Oktavo de Pasko. Laŭ ĉi tiu trajto – daŭrigas papo Francisko intervjuata de la ĵurnalist-pastro Antono Rizzolo – mi sentis, ke ekzistas ia deziro de la Sinjoro elmontri al la homoj sian mizerikordon».

La Sinjoro decidis sin prezenti per sia mizerikordo al mondo, en kiu plimultiĝas malbonaj sciigoj, kruelaĵoj kaj sovaĝagoj ne kredeblaj. Ni ĉiuj bezonas renkonti la mizerikordon, almenaŭ por venki la grandan timon, kiu enŝoviĝas inter la popolo kaj kondiĉas nian ĉiutagan vivon. Ni povas diri, ke alvenis la tempo, por ke la deziro de Dio kuntuŝiĝu kun nia aktuala bezono eliri el tiu ĉi neakceptebla situacio.

La unua paŝo farenda kaj proponata al ni ĉiamaniere estas rekoni nin kiel pekulojn, malkovri la balastojn, kiujn ni portas interne kaj kiuj malpermesas al ni vivi kun trankvilo kaj espero. Tiu ĉi paŝo estas farenda sen severaj postuloj, sen



Immagine di Gesù Misericordioso
dettato a Santa Faustina Kowalska
dipinto da Eugeniusz Kazimirowski

fare i moralisti, come spesso accade anche nelle migliori famiglie e perfino nella Chiesa. Siamo consapevoli che non riusciamo a guarire da soli, che non possiamo riscattarci con un lavoro fatto unicamente su di noi e fra di noi. È quindi doveroso riconoscerci tutti peccatori e fare diretta esperienza della misericordia di Dio.

Quando uno si riconosce peccatore ha già capito che non serve imprecare per le malvagità, che è urgente invece spostare l'attenzione dalle nostre miserie alla bellezza di Dio. Solo guardando a Dio, al suo sconfinato amore, alla sua dedizione nel liberare l'uomo da tutte le schiavitù e miserie, è possibile sostare nella realtà nuova e vivere respirando ossigeno.

Questo è un dato certo: più si parla o ci si lamenta di una cosa, più quella è presente e più occupa la nostra mente e la nostra vita. Quando il ciclista fissa troppo un sasso che gli sta davanti sulla sua strada non riesce ad evitarlo e ci va addosso, suo malgrado. Quando vediamo un ostacolo davanti a noi ci viene chiesto di decidere subito da che parte conviene passare, altrimenti ci andremo contro. Invece di protestare, siamo invitati a considerare con prontezza la via sulla quale passare. Chi si riconosce peccatore, non perde tempo a considerare il peccato e si affida totalmente alla bontà misericordiosa di Dio.

È arrivato il momento di puntare tutta l'attenzione di cui siamo capaci sulla misericordia di Dio, inventando una vita totalmente diversa, dove nessuno viene escluso, soprattutto per via del linguaggio adottato. Pur aggrappandosi alla propria lingua materna per difendere le proprie radici, siamo invitati ad adottare una lingua aperta a tutti, che è proprietà di nessuno e di tutti, che mette tutti sullo stesso piano, che permette una comunicazione immediata, a tu per tu con il fratello che puoi avvicinare per vivere un'esperienza impennata sulla misericordia.

konduti kiel moralistoj, kiel ofte okazas eĉ en la plej bonaj familioj kaj ankaŭ en la Eklezio. Ni konscias, ke ni ne sukcesas resaniĝi sen helpo, ke ni ne povas elaĉeti nin nur per simpla laboro farita sur ni kaj inter ni. Pro tio estas devige sin rekoni ĉiuj pekuloj kaj rekte sperti la mizerikordon de Dio.

Kiam iu rekonas sin pekulo, jam li komprenas, ke ne estas utile sakri pro la malbonaĵoj, kaj, male, urĝas deturni la atenton de niaj mizeroj al la beleco de Dio. Nur rigardante al Dio, al lia senlima amo, al lia sinofero por la libereco de la homo el ĉiuj sklavecoj kaj mizeroj, ni kapablas haltadi en la nova realaĵo kaj vivi, spirante oksigenon.

Tiu ĉi estas certa: ju pli oni parolas aŭ plendas pro io, des pli tio ĉeestas kaj okupas nian menson kaj nian vivon. Kiam ciklisto fikse rigardas ŝtonon, kiu staras antaŭe survoje, li ne sukcesas eviti ĝin kaj frapas kontraŭ ĝi, malgraŭ ĉio. Kiam ni rimarkas baron antaŭ ni, estas petite de ni decidi tuj laŭ kiu flanko estas oportune trairi, alimaniere ni iras kontraŭ ĝin. Anstataŭ plendi, ni estas invitataj prikonsideri rapide la vojon sur kiu transiri. Kiu rekonas sin kiel pekulon, tiu ne forperdas la tempon konsiderante la pekon kaj komplete konfidas sin al la mizerikorda boneco de Dio.

Alvenis la momento por direkti la tutan atenton, kiun ni kapablas, al la mizerikordo de Dio, elpensante tute alian vivon, kie neniu estas flankelasata, precipe pro la lingvo de li utiligata. Eĉ se alroĉiĝintaj al nia patrina lingvo por defendi niajn radikojn, ni estas invitataj alpreni lingvon, kiu estas malfermita al ĉiuj, kiu estas posedaĵo de neniu kaj de ĉiuj, kiu metas ĉiujn je la sama nivelo, kiu ebligas senperan komunikadon, vidalvide kun la frato, kiun vi povas alproksimigi por vivi sperton enradikitan ĉirkaŭ la mizerikordo.

Dirite inter ni ...



047

EN TRAJNO

- Bonvenon!
- Saluton!
- Ĉu mi helpu vin?
- Dankon.
- Viaj valizoj estas sufiĉe pezaj.
- Sed vi helpis min, kaj ni sukcesis kuŝigi ilin en la ĝusta loko.
- En ordo, tiamaniere ni ne ĝenos la aliajn pasaĝerojn.
- Bone.
- Ĉu vi iros ĝis Trieste?
- Jes, mi iros tien.
- Mi naskiĝis tie.
- Mi iras viziti kelkajn parencojn.
- Ĉu vi havas parencojn en Triesto?
- Jes, mia patrino naskiĝis en tiu urbo.
- Ĉu vi vizitas Trieston ofte?
- Ne tro ofte, sed de tempo al tempo.
- Ĉu vi havas multajn parencojn tie?
- Verdire, mi ilin havis, nun preskaŭ ĉiuj estas en la tombejo.
- Nu, vi iras viziti vivantojn kaj mortintojn.
- Jes, sed mi neniam sukcesis trovi la tombon de du miaj onklinoj.
- Vi povas peti informojn en la oficejo ĉe la enirejo.
- Mi provis, sed senrezulte.
- Kial?
- Ĉar mi ne konas la familian nomon kaj la mortdatojn de tiuj onklinoj.
- Ĉu neniu povas helpi?
- Mi provis rekonstrui plurfoje la historion de la familio, sed mi perdiĝis en la pasinteco sen ricevi respondon.

IN TRENO

- Benvenuto !
- Salve !
- Posso aiutarla?
- Grazie.
- Le sue valige sono abbastanza pesanti.
- Ma lei mi ha aiutato, e siamo riusciti ad adagiarle nel luogo giusto.
- A posto, in questa maniera non daremo fastidio agli altri passeggeri.
- Bene.
- Va fino a Trieste?
- Sì, vado là.
- Là sono nato.
- Vado a far visita ad alcuni parenti.
- Ha parenti a Trieste?
- Sì, mia madre è nata in quella città.
- Va spesso a Trieste?
- Non molto spesso, ma di tanto in tanto.
- Ha molti parenti là?
- A dir la verità, ne avevo, ora quasi tutti si trovano al cimitero.
- Beh, va a far visita ai viventi ed ai morti.
- Sì, ma non sono mai riuscito a trovare la tomba di due delle mie zie.
- Può chiedere informazioni all'ufficio presso l'entrata.
- Ho provato, ma senza risultato.
- Perché?
- Poiché non conosco i cognomi e le date di morte di quelle zie.
- E nessuno può essere d'aiuto?
- Ho provato più volte a ricostruire la storia della famiglia, ma mi sono perduto nel passato senza ricevere una risposta.

- Eble vi povus iri al la oficejoj de la Komunumo.
- Tio estas ideo, kaj iam aŭ tiam mi tion faros.
- Nun vi devas pensi pri la vivantoj.
- Jes, tiuj atendas min.
- Kaj vi povos multon rakonti pri vi.
- Ne tro multe, ĉar mi estas pastro kaj mia vivo estas sufiĉe normala.
- Kie vi vivas?
- Mi loĝas en abatejo benediktana apud Bolzano.
- Sed vi ne estas benediktano, laŭ la vestoj, kiujn vi surhavas.
- Vi pravas, mi ne estas benediktano, sed mi helpas en la abatejo.
- Ĉu vere?
- Jes, por la vokiĝoj estas momento kriza.
- Tion mi scias.
- Kaj tial mia episkopo sendis min helpi la benediktanojn.
- Sed, ĉu tio estis vere necesa?
- Imagu, ke en la abatejo mortis 13 sacerdotoj, kaj nur unu nova alvenis.
- Multaj mortintoj kaj neniuj naskiĝinto.
- Kion vi diras?
- Mi faras simplan komparon.
- Tio estas?
- Ankaŭ en Trieste estas la sama situacio.
- Ĉu vere?
- He, jes.
- Ĉu estas multaj mortintoj en Triesto?
- Kiam mi legas la gazeton, mi trovas multajn mort-anoncojn.
- Tio okazas en ĉiuj urboj.
- Sed aparte en Triesto.
- Kial vi asertas tion?
- Ĉar iam en la gazeto oni publikigis ankaŭ la nombron de la naskiĝintoj.
- Forse può andare negli uffici del Comune.
- Questa è un'idea e una volta o l'altra lo farò.
- Ora deve pensare a coloro che vivono.
- Sì, quelli mi aspettano.
- E potrà raccontare molte cose di lei.
- Non troppo, perché sono un sacerdote, e la mia vita è abbastanza normale.
- Dove vive?
- Abito in un'abbazia benedettina vicino a Bolzano.
- Ma lei non è benedettino, secondo gli abiti che indossa.
- Ha ragione, non sono un benedettino, ma do un aiuto nell'abbazia.
- Veramente?
- Sì, per le vocazioni c'è un momento di crisi.
- Lo so.
- E per questo il mio vescovo mi ha mandato ad aiutare i benedettini.
- Ma ciò era proprio necessario?
- Immagini che nell'abbazia sono morti 13 sacerdoti e ne è arrivato solamente uno nuovo.
- Molti morti e nessun nato.
- Cosa dice?
- Faccio un semplice paragone.
- Cioè?
- Anche a Trieste c'è la stessa situazione.
- Davvero?
- Eh, sì.
- Ci sono molti morti a Trieste?
- Quando leggo il giornale trovo molti annunci funebri.
- Questo succede in tutte le città.
- Ma particolarmente a Trieste.
- Perché afferma questo?
- Perché una volta nel giornale si pubblicava anche il numero dei nati.



- Ĉu nun oni ne plu publikigas tion?
- Mi ne plu sukcesis ĝin trovi.
- Kaj kio okazis tiam?
- Nu, la statistiko diris: 10 mortintoj, 1 naskiĝinto; 14 mortintoj, 2 naskiĝintoj, ktp.
- Ĉu okazis tiel?
- Oni povas diri, ke ĉiun jaron la urbo malpliigis je 3000 loĝantoj.
- Kaj de kio tio dependas?
- De la manko de junaj paroj.
- Kial?
- Ĉar la junuloj malfacile trovas laboron en ĉi tiu urbo, kaj konsekvence ili iras al aliaj lokoj.
- Konkrete dirite, la urbo ne ricevas novan limfon.
- Ĉar la familioj formiĝas aliloke.
- Bedaŭrinde.
- Sed mi vidis multajn junulojn en la urbo okaze de miaj antaŭaj vizitoj.
- Temas pri junuloj, kiuj venis al la urbo por studi, ĉar bone konataj estas la prilingvaj institutoj de Triesto.
- Ankaŭ la universitato.
- Vi pravas. sed ne nur...
- Kompatinda Triesto...
- Vere kompatinda.
- Kaj vi, kion vi faras en Triesto?
- Mi havas mian parencaron.
- Kaj vi ĝin vizitas.
- De tempo al tempo.
- Ĉu vi vivus en Triesto?
- Certe, ke mi vivus en Triesto. Ĝi estas
- Ora non lo si pubblica più?
- Non son più riuscito a trovarlo.
- E che cosa succedeva allora?
- Ebbene, la statistica diceva: 10 morti, un nato; 14 morti, 2 nati, ecc.
- Succedeva così?
- Si può dire che ogni anno la città si impoverisce di 3000 abitanti.
- E da che cosa dipende questo?
- Dalla mancanza di giovani coppie.
- Perché?
- Perché i giovani trovano difficilmente lavoro in questa città e di conseguenza se ne vanno in altri luoghi.
- Per dirlo concretamente, la città non riceve nuova linfa.
- Perché le famiglie si formano altrove.
- Purtroppo.
- Ma ho visto molti giovani in città in occasione delle mie visite precedenti.
- Si tratta di giovani che sono venuti nella città per studiare, perché son ben conosciuti gli istituti linguistici di Trieste.
- Anche l'università.
- Ha ragione, ma non soltanto...
- Povera Trieste...
- Veramente povera.
- E lei, che cosa fa a Trieste?
- Ho i miei parenti.
- E fa loro visita.
- Di tanto in tanto.
- Vivrebbe a Trieste?
- Certamente, che vivrei a Trieste. È una

- urbo tre bela.
- Oni diras, ke ĝi estas multekosta.
 - Temas pri onidiroj.
 - Ĉu ĝi ne estas multekosta?
 - Se kompari ĝin kun aliaj italaj urboj, tute ne.
 - Kio ne estas multekosta?
 - La apartamentoj, ekzemple.
 - Kaj?
 - La nutraĵoj.
 - Nu, tiuj estas du fortaj kialoj favore al Trieste
 - Sed en Trieste oni ne trovas laborpostenojn.
 - Tion mi scias.
 - Antaŭ multaj jaroj, mi devis migri al Milano por ricevi vivtenajn rimedojn.
 - Ĉu vi nun vivas en Milano?
 - Jes, nuntempe mi vivas en Milano, ĉar tie mi laboras.
 - Ĉu al vi plaĉas Milano?
 - Kompreneble, kaj mi priploros ĝin, kiam mi iros vivi aliloken.
 - Ĉu vi intencas forlasi Milanon?
 - Jam farite. mi estas stariganta apartamenton en Brescia.
 - Ankaŭ Brescia estas bela urbo.
 - Mi konsentas, sed ĝi ne estas interesa kiel Milano aŭ bela kiel Triesto.
 - Ĝi ne havas la maron, sed ĝi havas montaron.
 - Nu, oni devas kontentiĝi.
 - Ĉu vi havas konatulojn en Brescia?
 - Bonŝance, jes.
 - Kiuj ili estas?
 - Ili estas pluraj, sed sufiĉas diri, ke tie logas mia filo, kun la edzino, sed ĉefe kun mia nepeto.
 - Ha, jen la kialo de via iro al Brescia.
 - La alvoko de la propra sango.
- città molto bella.
- Si dice che sia molto cara.
 - Si tratta di dicerie.
 - Non è cara?
 - Se dobbiamo confrontarla con altre città italiane, no affatto.
 - Cosa non è caro?
 - Ad esempio gli appartamenti.
 - E?
 - Gli alimenti.
 - Ebbene, son due motivi forti in favore di Trieste.
 - Ma a Trieste non si trovano posti di lavoro.
 - Lo so.
 - Molti anni fa son dovuto emigrare a Milano per ricevere i mezzi di sostentamento.
 - Adesso vive a Milano?
 - Sì, ora vivo a Milano, perché lavoro là.
 - Le piace Milano?
 - Naturalmente, e la rimpiangerò quando andrò a vivere altrove.
 - Intende abbandonare Milano?
 - Già fatto, sto mettendo in piedi un appartamento a Brescia.
 - Anche Brescia è una bella città.
 - Sono d'accordo, ma non è interessante come Milano o bella come Trieste.
 - Non ha il mare, ma ha i monti.
 - Beh, bisogna accontentarsi.
 - Ha conoscenti a Brescia?
 - Per fortuna sì.
 - Chi sono?
 - Sono diversi, ma è sufficiente dire che là abita mio figlio, con sua moglie, ma soprattutto il mio nipotino.
 - Ah, ecco il perché della sua andata a Brescia.
 - Il richiamo del proprio sangue.

Nia eta Parnaso

Rubrica dedicata alla Poesia

Rubriko dediĉita al Poezio

AMO LA VITA

MI AMAS LA VIVON

*Amo la vita
perché la vita è
il più prezioso dono
di Dio,
voglio la vita
perché la vita è
la luce dell'universo,
benedico la vita
perché la vita è
come una finestra che
si apre sul mondo
e tu
per un istante
ti affacci
per ritornare poi
al nulla eterno.*

*Mi amas la vivon
ĉar la vivo estas
la plej valora donaco
de Dio,
mi volas la vivon
ĉar la vivo estas
la lumo de la universo,
mi benas la vivon
ĉar la vivo estas
kvazaŭ fenestro
malfermita sur la mondo
kaj vi
por momente
alfenestriĝas
por poste reveni
al la eterna nenio.*

GRATA

DANKEMA

*Grata a te
se da insospettate sorgenti
la mia poesia fuoriesce
alla luce.*

*Forse era già in me
ma io non lo sapevo.*

*Dankema al vi
se el neimageblaj fontoj
mia poezio eliras
al la lumo.*

*Eble ĝi jam estis en mi
sed mi tion ne sciis.*

Anna Amorelli Gennaro

(esperantigis Norma Cescotti)

LA KVAR BIBLIAJ TAGOJ EN BAIA MARE (Rumanio)

– kaj pri la travivaĵoj de la alveturado – (informis: Norma Cescotti)



Ĉi-jare la kvar Bibliaj Tagoj, organizitaj de Stefan Lepping, okazis de la 6a ĝis la 10a de aprilo, en Baia Mare, granda urbo en la nordorienta parto de Rumanio. Kunlaboris por la organizo ankaŭ Maria Laszlo, rumana, de longe aktiva esperanta agantino kaj ofta vizitantino de niaj kongresoj, ŝia fratino Maria Tereza kaj ŝia nepino Helga, universitata studentino. Dum niaj ekskursoj, ĉiĉeronis ankaŭ la rumana Gabriella Stier-Fischer.

Partoprenis la kunvenon dek kvin esperantistoj alvenintaj el Germanio, Italio, Ĉeka Respubliko, Slovakio kaj, kompreneble, Rumanio, iuj el ili katolikoj, aliaj luteranoj kaj ortodoksoj. Oni gastigis nin en la katolika preĝejo, dum la religiaj ritoj kaj kantoj kaj en la apuda paroĥa domo por la prelegoj kaj matenmanĝoj. Pri tranoktado kaj manĝoj ni estis loĝataj ĉe la hotelo Roxana Imperial, kiu distancas de la preĝejo dek minutojn da piediro.

La kvinan de Aprilo, antaŭtago de la kunveno, mi kaj Felice Sorosina renkontiĝis frumatene en Verono por ekveturi kaj, post mallonga halto ĉe Vicenza, por kuniĝi kun Francesca Trussardo. La vojaĝo prezentiĝis longa kaj laciga, pro tio ni jam antaŭmendis du ĉambrojn ĉe junulargastejo en Maribor (Slovenio), duone de nia itinero, por tranokti dum la iro-kaj -reiro de nia vojaĝo.

Tiun unuan vesperon, atinginte Maribor je la sunsubiro, ni vizitis la urbon, serĉante lokon por rapida vespermanĝo, poste ni klopodis, en malfrua nokto, direktiĝi al nia hotelo sed, pro la mallumo, ni ne trovis la ĝustan straton. Timante la fermon de la hotelo, je la 23a horo, ni klopodis peti helpon tien kaj tien utiligante la bonan konon de Francesca pri la angla lingvo ĝis ni renkontiĝis junan paron, kiu invitis nin eniri en sian aŭton kaj akompanis nin ĝis nia dormejo. Ni, poste volis donaci al tiuj gesinjoroj por rekompenco, pake-ton da itala kafo, kiun Felice kunportis por nia vojaĝo.

La sekvan matenon frue ni reprenis la vojaĝon sed, antaŭ ol atingi la hungaran limon, malagrable surprizo atendis nin. Grupo da hungaraj senuniformaj policianoj (tiel ili kvalifikiĝis kvankam ne havante iun rekon-signon) bruske haltigis nin, elaŭtigis nin, deprenis ĉiujn niajn dokumentojn, inspektis ĉion kaj ordonis ke ni pagu € 52.- kiel mon-puno ĉar ni ne havis hungaran “vinjeton”. Tie estis ankaŭ alia grupeto de vojaĝantoj, kiuj plendis pro la sama sorto, kaj ĉiuj kune ni protestis kontraŭ la ordonon klarigante ke ne-niu el ni vidis laŭvoje iun ajn informon aŭ indikon pri vinjeto. Sed vane: ni ĉiuj nepre pagis monpunon por obteni la rajton repreni la vojaĝon. Ni konsoliĝis en Budapeŝto, fotante sur la ponto Elizabeto la riveron Danubo kaj admirante, de la altaĵo “Cittadella” la panoramon de tiu mirinda urbo.

Ni atingis la celon, Baia Mare, ĉe la vesperiĝo. Kun iom da malfacilaĵo, pro manko de indikoj, ni trovis la hotelon Imperia Roxana. Tie la jam alvenintaj geamikoj tre varme akceptis nin. Ni kune vespermanĝis sidante ĉirkaŭ runda tablo: “13 manĝantoj kiel la apostoloj kun Jesuo”, iu amuze rimarkis.

Ĵaŭdon, la 7an, post la Rozario, la Meso kaj la matenmanĝo, ekis oficiale la kunveno.

La benediktano patro Willibald prelegis pri la unua parto de la libro de la profeto Jesaja. Ĝi estas la plej pesimisma parto, en kiu oni rakontas pri popolo, kiu ne volas konvertiĝi kaj, eĉ ne aŭskultante la admonon de la profeto, ĝi sin montras pli kaj pli obstina en sia konduto.

La posttagmezon ni vizitis la urbon, parte per buso, parte per promenado. La gvidantinoj Maria Laszlo kaj Gabriella Stier-Fischer priskribis placojn, preĝejojn, palacojn kaj iliajn historiojn.

Vendredon la okan, la mateno forpasis kiel la antaŭa tago. Patro Willibald daŭrigis sian prelegon parolante pri la dua parto de la libro de Jesaja: la ekzilio al Babelo, urbo komparata al kompleta forhakiĝo de arbo, tial ke el ĝi restas nur la trunko. Por tiuj kiuj amas sian popolon kaj sian religion, tiu estas senespera situacio. Sekve daŭrigis la juna luterana pastoro Wolfram Rohloff, kiu prelegis pri la sama temo, sed prezentante ĝin alimaniere.

Posttagmeze, post ĉirkaŭ du horoj de perbusa vojaĝo, ni alvenis al Bârsana por viziti la rekonstruitan ortodoksan monaĥinejon. Dum la reveno ni vizitis preĝejon el ligno, proklamitan “havaĵo de Unesko”.

Sabaton la 9an, patro Willibald finis sian prelegon pri la tria parto de la libro de Jesaja. Post tiom longa foresto de la juda popolo kaj de la kulto, okazis ia “resurekto”: la persa reĝo Ciro supervenkis Babelon kaj ordonis al la judoj reiri al sia lando, rekonstrui la templon en Jerusalemo kaj repreni la kulton al unu Dio de Israel. Rigardante la promesojn de vera daŭra feliĉo kiel sekvo de sincera reveno al Dio, oni komprenas, ke ne temas nur pri politika situacio de la tiamaj tempoj, sed temas pri la sama nuntempa historio, ĉar la feliĉo ne estas nur en la mondo sed ĝi trapasas la limojn atingante la eternan savon. Pri tio eĉ ludas la kantikoj de la Servanto de Dio en la Nova Testamento.

Posttagmeze la ortodoksa pastro invitis

nin viziti sian preĝejon. Poste ni iris al lia paroĥa domo, kie atendis nin agrabla regalado. Kvar paroĥaninoj kantis rumanajn kantojn, je kvar voĉoj, sen muzika akompano. Ili klariĝis al ni la kialon: “La homa voĉo estas donaco de Dio, la muzika instrumento estas farita de homoj”. Poste ni iris al la Stefana Turo, nura restaĵo de la antikva paroĥa preĝejo en Baia Mare. Ĝi suferis siatempe plurajn ŝanĝiĝojn kaŭze de daŭraj disputoj inter malsamaj konfesioj. Nun la turo estas utiligata kiel ekumena kapelo. Ĉi-tie la luterana pastoro Wolfram celebris la diservon kun la Sankta Manĝo.

Poste ni iris al la katolika preĝejo, kie triopo de junaj muzikistoj ofertis al ni koncerton, per pianolo kaj klarionoj, ludante muzikon de Chopin.

Post la vespermanĝo nia grupo disiĝis: iuj restis ĉetabla por konversacii, aliaj retiriĝis por pretigi la morgaŭan vojaĝon. La plej junaj malsupreniris al suba diskoteko por resti ĝis la tria matene. Mi kun Feliĉe vizitis ĉiujn ĉirkaŭurbajn benzinstaciojn por aĉeti hungaran vinjeton ĝis la solvo okazinta preskaŭ je noktomezo.



Dimanĉon, la 10an, ni tri italoj ne partoprenis la fermon de kunveno kaj la sekvan komunan adiaŭan Diservon. Post la Meso kaj la matenmanĝo ni forveturis por alfronti alian longan vojaĝon, ĉi-foje sen problemoj.

Ĉiu el ni kunportis en la okuloj kaj en la koro la bildojn de la belega Rumanio, de ĝia verda montaro kovrita de arbaroj, de ĝiaj ĝardenoj kun multkoloraj floroj, de la gaja, sincera rideto de ĝiaj loĝantoj.

OTTOCENTO ANNI FA AD ASSISI

« Vi voglio tutti in Paradiso »

Una notte del 1216, Francesco d'Assisi era immerso nella preghiera e nella contemplazione nella chiesetta della Porziuncola. Improvvisamente vi dilagò una vivissima luce e Francesco vide sopra l'altare il Cristo rivestito di luce e alla sua destra la Madonna, circondati da una moltitudine di Angeli.

Francesco adorò in silenzio con la faccia a terra il suo Signore.

Gli chiesero allora che cosa desiderasse per la salvezza della anime. La risposta di Francesco fu immediata: «Santissimo Padre, benché io sia misero e peccatore, ti prego di concedere ampio e generoso perdono, con una completa remissione di tutte le colpe, a tutti coloro che, pentiti e confessati, verranno a visitare questa chiesa».

Gli disse il Signore: «Quello che tu chiedi, o Frate Francesco, è grande, ma di maggiori cose sei degno e di maggiori ne avrai. Accolgo quindi la tua preghiera, ma a patto che tu domandi al mio vicario in terra, da parte mia, questa indulgenza».

Francesco si presentò subito dal Pontefice Onorio III, che in quei giorni si trovava a Perugia, e con candore gli raccontò la visione avuta. Il Papa lo ascoltò con attenzione e, dopo qualche difficoltà, diede la sua approvazione, poi disse: «Per quanti anni vuoi questa indulgenza?». Francesco rispose: «Padre Santo, non domando anni, ma anime». E felice si avviò verso la porta, ma il Pontefice lo richiamò: «Come, non vuoi nessun documento?». E Francesco: «Santo Padre, a me basta la vostra parola! Se questa indulgenza è opera di Dio, egli penserà a manifestare l'opera sua; io non ho bisogno di alcun documento, questa carta deve essere la Santissima Vergine Maria, Cristo il notaio e gli Angeli i testimoni».

E qualche giorno più tardi, insieme ai Vescovi dell'Umbria, disse, tra le lacrime, al popolo convenuto alla Porziuncola: «Fratelli miei, voglio mandarvi tutti in Paradiso!».

San Francesco d'Assisi viaggiava molto, passando da un villaggio all'altro, dalla città alla montagna, sulle strade degli uomini per accompagnarsi con loro.

La gente amava ascoltare la sua parola, una parola che appariva sempre nuova, come una nuova evangelizzazione portata con dolcezza su un volto credente, con i piedi scalzi e senza far uso di strumenti di convinzione.

Francesco appariva così fragile e povero che nessuno pensava a un possibile plagio.

Francesco parlava in nome di un Altro, che chiamava «Altissimo, onnipotente, bon Signore».

Noi oggi siamo sulle sue tracce e possiamo innamorarci di lui, anche dopo ottocento anni, pur tenendo conto dei nostri limiti e del nostro scarso addestramento ai valori dello spirito. Se la nostra fede è poca, allora è giusto mettersi in viaggio: Francesco può suggerire anche a noi un piccolo percorso di conversione alla vita buona del Vangelo.

La gioia del Vangelo è dono della misericordia del Padre, che, attraverso i suoi santi, in ogni momento ci vuole incontrare davvero per un abbraccio pieno, colmo di affetto.

È una grazia sostare in Assisi dove san Francesco ha vissuto annunciando la vita buona del Vangelo. Noi sentiamo ancora le pietre parlare di lui e delle sue lodi a Dio, grande amante dell'umanità.

Anche i santuari e le case e i pellegrini sono annunzi di un mondo che pure noi desideriamo. Entrare fra le case, percorrere i viottoli, salire e scendere le scale, attraversare le piazze sarà come ottocento anni fa, con un sogno che non si infrange neanche con la realtà di oggi.

Le chiese hanno immortalato un'esperienza spirituale e mistica che non può più sparire dalla faccia della terra.

(fra Pierluigi)



Renkontiĝo kun papo Francisko

D-ro Antonio de Salvo raportas:

Hodiaŭ, la 21-an de aprilo 2016, je la 7-a matene, mi ĉeestis, kune kun malgranda grupo da parokanoj, la Meson celebrantan de Papo Francisko en la Kapelo Sankta Marta en Vatikano. Post la Meso, la Papo salutis unuope la ĉeestantojn. Kiam estis mia vico, mi diris: «Santo Padre, anch'io sogno in Esperanto!». La Papo

videble gajĝis, kaj kun "friponeŝa" mieno diris: «Le è piaciuta, eh?». Tiam mi aldonis: «Sono il Presidente dei cattolici esperantisti» – verdire mi "estis" tia – sed, kompreneble, mi volis pli rekte imponi. La Papo eĉ pli gajĝis.

NORME E QUOTE ASSOCIATIVE PER L'ANNO 2016

Associato ordinario <i>con Katolika Sento</i> (SO)	22,00 €
Associato giovane <i>con Katolika Sento</i> (SG)	11,00 €
Associato familiare <i>senza Katolika Sento</i> (SF)	11,00 €
Associato ordinario <i>con Espero Katolika</i> (SOE)	43,00 €
Associato sostenitore <i>senza Espero Katolika</i> (SS)	44,00 €
Associato sostenitore <i>con Espero Katolika</i> (SSE)	86,00 €
Solo abbonamento a <i>Katolika Sento</i> (AK)	10,00 €
Solo abbonamento a <i>Espero Katolika</i> (AE)	21,00 €

È associato giovane chi non ha superato i 25 anni. È associato familiare chi convive con altro associato. Specificare nella causale del versamento la categoria dell'associato, l'anno di nascita dei giovani, l'esatto indirizzo per il recapito del periodico K.S., la destinazione di eventuali offerte. I gruppi locali con almeno 10 soci trattengono 2,10 € per l'associato ordinario e 1,05 per l'associato giovane o familiare.

I versamenti vanno fatti sul C.C. Postale n. 47127675 *Unione Esperantista Cattolica Italiana U.E.C.I.*

codice IBAN: IT66 R076 0101 6000 0004 7127 675 Codice BIC/SWIFT: BPPIITRRXXX

Nota: Sull'etichetta/indirizzo con la quale avete ricevuto questa copia di *Katolika Sento* è indicata la sigla associativa e l'anno di scadenza dell'abbonamento.

COMITATO CENTRALE U.E.C.I.

Presidente: Giovanni DAMINELLI, via Lombardia 37, 20099 Sesto S. Giovanni (MI) – tel. 02.2621149 – katolika.sento@ueci.it (la residenza del presidente è anche sede dell'associazione)

Vice presidente: Norma COVELLI CESCOTTI, via E. Fermi 29, 38100 Trento – tel. 0461.925210

Segretario/cassiere: fra Pierluigi SVALDI, Belvedere San Francesco 1, 38122 Trento – tel. 0461.230392

Consulente culturale-religioso: Ida BOSSI, Viale Faenza, 26/7 20142 Milano

Responsabile dei congressi: Giovanni CONTI, via F. Filzi 51, 20032 Cormano (MI) – tel. 02.66301958

Consulente informatico: Tiziana FOSSATI, via F. Filzi 30/A, 20035 Lissone (MB) - tel. 039.464942

Consulente editoriale: Carlo SARANDREA, Via di Porta Fabbrica 15, 00165 Roma – tel. 06.39638129

Addetto alla logistica: Felice SOROSINA, Via Sarnico 17, 24060 Tavernola (BG) – tel. 035.932298 –

Assistente Ecclesiastico: mons. Giovanni BALCONI, p.zza Duomo, 16, 20122 Milano

Nota bene: Tutte le comunicazioni alla redazione di *Katolika Sento* vanno spedite al presidente UECl.

AMUZE

Ĉiuj ajn rajtas kontribui sendante al ni siajn humoraĵojn, kondiĉe ke ili estu en Esperanto.



(el www.gioba.it) - sendis Tiziana Fossati

Rutinaj respondoj

Pastro devas transpreni kiel anstataŭanto la Diservon en la najbara komunumo.

Li paŝas al la mikrofono, frapetas ĝin kaj diras:

– Mi kredas ke ĉe la mikrofono io ne funkcias.

La respondo de la tuta kunveno:

– Kaj kun via spirito.

(sendis Karl Heinz Schaeffer)

Proverbo

Bela virino bezonas belan veston, sed malbela virino, pli belan.

Muzika vespero

– Ĉu al vi plaĉis la violona ludado de mia filino?

– Jees... sed mi kredas, ke estas multe da pres-eraroj en la muzik-notoj.

Svatisto

– Kial vi ne volas fraŭlinon Kamila kiel vian edzinon?

– Pro ŝia pasinteco.

– Mi certigas vin, ke ŝia pasinteco estas tute senmakula.

– Sendube; sed ĝi estas tro longa.

Hazarda renkontiĝo

– Petro!! ... Nekredeble! kia surprizo!... ni ne renkontiĝas de almenaŭ dudek jaroj... Certe ke de tiam vi multege ŝanĝiĝis.

– Sed mi ne nomiĝas Petro.

– Hoj! vi ŝanĝis ankaŭ vian nomon.

Prunton peto

– Ĉu vi ne povus pruntedoni al mi 500 eŭrojn?

– Jes, mi ne povus pruntedoni ilin al vi.

En hospitalo

La kuracisto, kun funebra mieno, diras al la paciento:

– Estas mia devo, informi vin, ke vi estas tre grave malsana. Ĉu estas homo kiun vi deziras vidi?

– Jes.

– Kiun?

– Alian kuraciston.

Poezia vespero

– Ĉu vi ne trovas sinjoro, ke la ĵus deklamita poeziaĵo estas tute senseenca?

– Pri tio mi ne povas juĝi, ĉar mi estas la aŭtoro.

– Pardonu, eble ja estis tiu junulino, kiu deklamis ĝin tute fuŝe.

– Ŝi estas mia filino.

– Pardonu, mi intencis paroli pri tiu maljunulino, kiu akompanis ŝin ĉe la piano.

– Ŝi estas mia edzino... kiel vi kuraĝas ofendi ŝin?

Helpa alvoko

– Sinjoro kuracisto, mi hazarde trinkis venenon por musoj anstataŭ vian kuracilon? Kion mi faru nun?

– Testamenton.

http://www.ueci.it/k_sento/ks_2016

